

## PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

- Oktobro 2008**  
 1 Kristin Tytgat pri interpretado kaj universitata interŝanĝo  
 8 Michel Dechy Villeneuve d'Ascq(Lille) pri kiel instrui Eon per 'Tinĉjo en Tibeto'  
 15 Semajna kunveno  
 22 Semajna kunveno  
 29 Semajna kunveno
- Novembro 2008**  
 5 Asembleo ĝenerala de Esperantista Brusela Grupo  
 7-9 Semajnfina staĝo en Morbecque, norda Francio  
 12 Diskuto pri la staĝo en Morbecque  
 19 Bernard-Regis Larue pri Astronomio, la Suno  
 26 Alejandro Cossavella el Argentino koncertas  
 29 Sabata malferma tago en Roterdama Centra Oficejo, UEA / TEJO
- Decembro 2008**  
 3 André Demarque pri kiu estas esperantisto  
 10 Vladimira Chvatalova pri ŝia projekto de helpo al orfoj en Afriko  
 13 Sabata festo pro Zamenhof-tago (15/12)
- Januaro 2009**  
 7 Unua merkreda kunveno de la jaro, rakontu pri Kristnasko kaj Novjaro  
 14 Bernard-Regis Larue pri Astronomio, planedoj Merkuro, Venuso, Urano, Neptuno  
 21 André Demarque pri neologismoj (kun lemanoj 2a grado)  
 28 Michael Cwik pri prezentado de fotoj de UK kaj aliaj



Kara abonanto, por ke vi ne ĉesu ricevi Aktualan, bonvolu pagi tuj 10€ abonkotizon 2009 al kasisto.

### KOTIZ - TABELO 2009

Dumonata "Aktuala" reijĝos monata

Nr.	Kodo	Kategorio kaj Kotizo	€	Rajtoj
<b>ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO</b>				
11	MEM	Membro de EBG	10	Abono al "Aktuala" (organo de EBG)
12	MEM-R	Membro-junulo (ĝis 26-jara)	5	+
13	MEM-S	Membro-pensiulo, senlaborulo	7	partopreno en la vivo de la Grupo
14	FAK	Familia kunloĝanto	2	Partopreno en la vivo de la Grupo
18	DVM	Dumviva membro de EBG	250	Membreco kaj "Aktuala" dum la tuta vivo
<b>BELGAJ REGIONAJ ESPERANTO-ASOCIOJ</b>				
21	APE	"Association pour l'espéranto"	14	Membro+Abono al "Esperanto en Marche" (parte franclingva)
22	FEL	Flandra Esperanto-Ligo (FEL)	25	Membro+Abono al "Horizontaal" (grandparte nederlandlingva)
<b>UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO</b>				
31	SA	Abonanto de "Esperanto"	38	Abono al "Esperanto", monata organo de UEA
32	Kto	Abonanto de "Kontakto"	23	Abono al "Kontakto", junulara revuo de UEA
33	MJ	Membro kun "Jarlibro"	24	Membreco en UEA + "Jarlibro"
34	MA	Membro-abonanto de UEA	59	MJ + SA + Kto (se junulo) + rabato !
35	MG	Membro kun "Gvidlibro"	10	Membreco en UEA + "Gvidlibro" (sen la adresaro de delegitoj)
36	SZ	Membro de Societo Zamenhof	118	Honora rondo de esperantistoj, finance subtenantaj UEA
37	MD	Dumviva Membro de UEA	1475	MA de UEA dum la tuta vivo! (25XMA kotizo)



# ESPERANTO **aktuala**

**32-a ELDONIARO** Informilo fondita en 1976 de Leo de Bruyne, oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, centjara societo neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita N°0 419 498 274 en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge", honorigita reĝa societo ek de la 29a de Majo 1957.

Novembro - Decembro 2008

Nova Serio **N°6**

Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek; Prezidanto: Angelos Tsirimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Claude Gladly, cglady@arcadis.be, Abona membriĝo 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52 Sekretario: Hélène Falk-Bracke, 7 avenue des Chênes, 1640 Rhode StGenese, informas +32 2 3584214, helene.falk@skynet.be; Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkrede 18h30-20h metro MAALBEEK (tie nek poŝkesto nek telefono) Informoj: <http://users.belga.com.net/EBG> <http://ebg.skynetblogs.be> <http://uea.org> [www.esperanto.be](http://www.esperanto.be) [www.esperanto.net](http://www.esperanto.net) <http://eo.eventeo.net>

## ENHAVO

- Paĝo 2 - Hélène Falk-Bracke pri la tabelo de korelativoj
  - Paĝo 3 - Hajkoj kaj sonetoj
  - Paĝo 4 - Fabelo pri la dek-sepa regulo
  - Paĝo 6 - Finiĝis la erao de respondkuponoj kaj Kaŭkaza tensio
  - Paĝo 7 - Ĉu Roterdamanoj kaj Francoj aŭdis pri Esperanto
  - Paĝo 8 - Polico en UK Roterdamo
  - Paĝo 9 - Cenzurita artikolo kaj UEA ne plu fidus ILEI
  - Paĝo 11 - J.A.Pinto de Sousa pri lingva politiko de Eŭropa Unio
  - Paĝo 14 - Barack Obama retejas en Esperanto
  - Paĝo 15 - Kie esperantumi baldaŭ, [Zamenhof-festo de EBG](#)
  - Paĝo 16 - Programo kaj Kotiz-Tabelo
- Artikolo kun bildoj de Muriel Petit pri ŝia partopreno en IJK aperos en la venonta numero.*

## LA PAĜO DE HÉLÈNE FALK-BRACKE

### Pri la tabelo de korelativoj

Multaj komencantoj timas la lernadon de la **tabelo de korelativoj**. Al mi, ĝi estis respondo al demando kiu zorgigis min de longe. Ĉar mi rimarkis ke en la franca, plejmulto de la rilataj kaj demandaj pronomoj komenciĝas per la sono **K**

Kiam mi lernis la nederlandan, anglan kaj germanan, mi konstatis la samon – nur, en la germana, ĝi estas regulo sen escepto!

Qui	quoi	quand	comment	combien	quelle sorte de	pourquoi	à qui	où
Who	what	when	how	how much	what kind of	why	whose	where
Wie	wat	wanneer	hoe	hoeveel	wat voor een...	waarom	van wie	waar
Wer	was	wann	wie	wie viel	was für ein	warum	wessen	wo
<b>Kiu</b>	<b>kio</b>	<b>kiam</b>	<b>kiel</b>	<b>kiom</b>	<b>kia</b>	<b>kial</b>	<b>kies</b>	<b>kie</b>
Individu	groupe	temps	manière	quantité	qualité	cause	appartenance	lieu

Sed kvankam estas ia simileco en la demandovortoj, la respondoj en la naciaj lingvoj estas tute sensistemaj kaj oni devas lerni ilin parkere. Ekz. france : neni lingva rilato inter :

**quand (kiam) toujours ĉiam) jamais (neniam) une fois (iam)**

En Esperanto jes. Se mi metas la demandon KIAM, la eblaj respondoj estas : ĉiam, neniam, iam ĉiuj montras per la

komenc -literoj	{ <b>Ĉi</b> <b>Neni</b> <b>Ti</b>	ke temas pri	{ <b>kolektivo</b> <b>negativo</b> <b>demonstrativo</b>	} kaj per la du lastaj literoj (am) ke ĝi rilatas al <b>tempo.</b>
--------------------	--	--------------------	--	---

La tabelo estas nun simpla tabelo kun du enir-rimedoĵoj **Ĉiuj vortoj rilatas inter si** : ili korelativas unu kun la aliaj

Tamen, inter la eblaj respondoj, oni trovas **'parojn'** en la germanaj lingvoj kiel **ooit-nooit, ever-never, immer-nimmer**

Ĉu ili estas restaĵoj aŭ ĉu ili aperis en unu lingvo kaj estis alprenitaj de aliaj lingvoj ? aŭ ...?

**Certe, Ludoviko Zamenhof rimarkis, analizis kaj trovis genian solvon al tiuj tiklaj problemoj**

Hélène Falk

[**Komento de la redakcio** : ne nur en la menciitaj lingvoj aperas korelativoj. Fakte, la komenca qu- aŭ c- de la latina kaj la komenca hw- (perverse skribata wh- en la angla kaj simplig-ita al w- en la germana k nederlanda) de la ĝermanaj lingvoj estas parencaj inter si kaj kun la komenca p- aŭ t- de la greka kaj la komenca k/g- aŭ ĉ- de la slavaj lingvoj kaj devenas el sia komuna patrino, la prahindeŭropa. Sed ankaŭ en senrilataj lingvoj, kiel la hungara, troveblas sistemo tre simila kaj eĉ pli kompleta.]

**Ekzemplo el la moderna greka :**

kápjos	kápu	kápote	kápos
pjos?	pu?	póte?	pos?
állos	allú	állote	aljós
(“iu,	ie,	iam,	iel ;
kiu,	kie,	kiam,	kiel ;
alia,	aliloke,	alitempe,	alimaniere”
en la moderna greka lingvo)			

## KIE ESPERANTUMI BALDAŬ

**7-9 Novembro: Staĝo en Morbecque, Norda Francio**, vendrede al dimanĉe, kun prelegoj de Mickaël Bronstein, Arlette kaj Edmond Plutniak, magia spektaklo de Triksini, kvin kategorioj de kursoj gvidataj de Kristin TYTGAT, Claude LONGUE-ÉPÉE, Xavier DEWIDHEM, Michel DECHY, Arlette PLUTNIAK.

Vidu <http://esperanto.nord.online.fr/eo/morbecque/>

**29 Novembro:** Sabata malferma tago en Roterdama **Centra Oficejo**, UEA/TEJO .

**13 Decembro: Zamenhof-festo de EBG: Ni atendas vin, multnombrajn kaj entuziasmajn!** Kiel ĉiujare, dank'al la kutime sindona laboro de kelkaj de niaj membroj, nome S-inoj Françoise Pellegrin, Nelly kaj Clara Bracke, nia grupo festos la naskiĝtagon de Ludoviko Zamenhof (15/12), per aranĝo sub la signo de la lando de la venonta Universala Kongreso, do **Pollando**, sabaton la 13an de decembro 2008, de la 11h30 ĝis la 18h, en la kultura centro DE ZEYP, **Zeypstrato 47, 1083 Ganshoren** (Bruselo - planon vidu sube). Por elvoki Pollandon, ni ŝatus ke vi aldonu ion tiurilatan al viaj vestaĵoj aŭ ke vi vestu vin per **ruĝa kaj blanka** koloroj. Dum la distra programo, ni regalos vin **interalie** per skeĉoj kaj ankaŭ kantoj de pollanda horo. Polaj manĝaĵoj estos gustumigitaj. La libro-servo de FEL tenos standon ĉe la festo. Aliĝprezo: Nur distra programo (posttagmeze): **5 €** ; Aperitivo, lunĉo, distra programo, pagita kaj enirita en konto ĝis 28/11 : **15 €** ; Same aperitivo, lunĉo, distra programo, pagita post 28/11: **20 €** ; Pagenda ĝis vendrede la 28a de novembro al la kasisto de EBG, konto 000-0123 048-52 au poste surloke. **GRAVE:** por plej bone organizi la feston, ni nepre devas scii sufiĉe frue kiu partoprenos la manĝon. Vegetaranoj sin anoncu. Enskribu vin tuj ĉe la organizantoj: [babapel@hotmail.com](mailto:babapel@hotmail.com); **tel 02/358.27.28**. Se vi venos aŭte, eblos parki ĉe Zeypstrato . Metroe veturu ĝis stacio Simonis, kaj de tie pluiri per buso 87, kiu laŭiras av. van Overbeke; elbusiĝu je halto Nereus.



## LA MONDO STARAS KIEL UNU SOLA

Unuafoje okazas en historio de Usono, ke iu kandidato al prezidanteco uzas Esperanton en sia retejo. Jen traduko de prelego en Berlino de Barack OBAMA, usona senatoro por Illinois. <http://my.barackobama.com/page/community/post/ESPERANTO/qGx9PW>

Dankon al la civitanoj de Berlino kaj al la popolo de Germanio. Mi dankas al Kanceliero Merkel kaj al Ministro de Eksterlandaj Aferoj Steinmeier pro iliaj bonvenigoj hodiaŭ pli frue. Dankon al Urbestro Wowereit, al la Berlina Senato, al la polico, kaj precipe al vi ĉiuj mi dankas pro tiu bonvenigo. Mi venas al Berlino same kiel multaj el miaj samlandanoj venis antaŭe. Ĉi-vespere mi parolas al vi ne kiel prezidentkandidato, sed kiel civitano - fiera civitano de Usono, kaj de la mondo.



Mi konscias, ke mi ne similas la usonanojn, kiuj antaŭe parolis en ĉi tiu urbeĝo. La vojaĝo, kiu kondukis min ĉi tien, estas apenaŭ kredebla. Mia patrino naskiĝis en la koro de Usono, sed mia patro pasigis sian junaĝon prizorgante kaprojn en Kenjo. Lia patro - mia avo - estis kuiristo, domservanto por Britoj. Je la pinto de la malvarma milito, mia patro decidis, kiel tiom da aliaj en la forgesitaj anguloj de la mondo, ke lia sopiro - lia revo - postulis la liberecon kaj ŝancon promesatajn de la okcidento. Sekve li verkis leteron post letero al universitatoj tra Usono ĝis iu ie respondis lian preĝon por pli bona vivo.

... MALLONGIGITA ...

Homoj de Berlino - homoj de la mondo - Jen nia momento! Jen nia tempo!

Mi scias, ke mia lando ne perfektigis sin mem. Foje, ni klopodas subteni la promeson de libereco kaj egaleco por ĉiuj niaj popoloj. Ni faris erarojn, kaj estas tempoj, kiam niaj agoj tutmonde ne respondis niajn plej bonajn intencojn.

Sed mi ankaŭ scias, kiom multe mi amas Usonon. Mi scias, ke dum pli ol du jarcentoj, ni penas - kontraŭ granda kosto kaj grandaj oferoj - formi pli perfektan union; serĉi, kun aliaj nacioj, pli esperplenan mondon. Nia fideleco neniam estis al iu aparta tribo aŭ reĝlando - efektive, ĉiu lingvo estas parolata en nia lando; ĉiu kulturo lasas ĝian impreson sur la nia; ĉiu vidpunkto estas esprimata en nia publikaj placoj. Tio, kio ĉiam unuigas nin - kio ĉiam kuraĝigas nian popolon; kio logis mian patron al usonaj marbordoj - estas arto da idealoj, kiuj parolas pri aspiroj kundividataj de ĉiuj homoj: ke ni povu vivi sen timo; ke ni povas paroli kaj kunveni kun iu ajn, ke ni voĉdonas kaj elektas religion laŭ nia deziro.

Ĉi tiuj estas la aspiroj, kiuj ligis la destinojn de ĉiuj nacioj en ĉi tiu urbo. Ĉi tiuj aspiroj estas pli grandaj ol io ajn, kio apartigas nin. Estas pro ĉi tiuj aspiroj, ke la aertransporto komenciĝis. Estas pro ĉi tiuj aspiroj, ke ĉiuj liberaj homoj - ĉie - fariĝis civitanoj de Berlino. Estas en la serĉo de ĉi tiuj aspiroj, ke nova generacio - nia generacio - devas fari sian markon sur la mondo. Homoj de Berlino - kaj homoj de la mondo - la skalo de nia defio estas granda. La vojo antaŭen estos longa. Sed mi venas antaŭ vin por diri, ke ni estas la heredantoj de klopodoj por libereco. Ni estas popolo de apenaŭ kredebla espero. Kun okulo al la estonteco, kun persisto en niaj koroj, ni memoru ĉi tiun historion, kaj respondu nian destinon, kaj denove refaru la mondon. Dankon, Berlino. Dio benu vin! **Barack OBAMA:** Berlino, Germanio 24a de Julio, 2008

## HAKKOJ

*Pluvo kaj suno,  
falas kastanfolioj,  
flavas Aŭtuno.*

Hej, paserido,  
for, for de tie, venas  
ĉeval' en vido.

**KOBAJAŜI Issa**  
(1763-1828) 小林一茶 *japane*  
**MIJAMOTO Masao** tradukis



Luis Vaz de Camoens

Ĝentila animo mia, de la tero  
malĝoje foririnte tiel frue,  
ripozu en la ĉielo tempoflue  
kaj tie ĉi mi vivu en sufero.

Se nur en via sido en la etero  
pri vivo eblas rememori ĝue,  
la amon ne forgesu, kiun skue  
mi montris al vi en okulsincero

kaj se vi povos juĝi min merita  
je iom da konsol' pro la dolor'  
vin perdi en la disto infinita,

al Dio petu, vin preninta al glori,  
min porti tiel frue el tero spita,  
kiel li portis vin de mia kor' ...

**Luis Vaz de Camoens** (1524-1580) al amatino Dinamene, aziulino formortita en rivero Mekongo, Geraldo Mattos tradukis

## SONETOJ

La sunradio kiu al kurteno  
trapasas falante al mia plumo,  
estas la mesaĝo, kiun, per lumo,  
la suno montas por bona mateno.

La lumo rapide sur la ebena  
de la papero, kial blanka fumo,  
dispersigas; dume, plugas la plumo  
sulkojn en la skribfolia ĝardeno,

kie estos plantita nia sento  
atendante, ke tiu frukto mia,  
maturiĝos; tiam kiel torento,

iros al vi, kaj vi, per poezia  
formo, povos legi en la silento,  
ĉi tiun penson, kiu estas via.

**Alberto Garcia Orive, Bilbao**

Se pro la sorto kontraŭa, karulino,  
en via mano mia ĝojo nestas,  
nun sur la tero tomb' al vi ne restas,  
por ke al mi ne restu milda sino ...

La akvoj de la maro el fascino  
eterne vian strangan ĉarmon festas,  
sed, dum en mi sin vivo manifestas,  
vivanta ili trovos vin sen fino.

Kaj, se potencos tiom vers' sovaĝa,  
ke longan historion ĝi promesos  
al amo tiel pura kaj magia,

mi vin ekkantos per lir' omaĝa,  
kaj, dum memoro sur la ter' ne ĉesos,  
fariĝos mia verk' surskribo via.

## FABELO PRI LA DEK-SEPA REGULO

Foje f-ino Regultri, la tria regulo de la Fundamento, diris al sia koleginino f-ino Regulsep: – Venu, ni iru iom promeni!

F-ino Regulsep hezitis: – Ni ne rajtas forlasi la Fundamenton. Vi scias, ke s-ro d-ro Lavojo, la prezidanto de la Akademio, malpermesas tion.

– Ba, s-ro Lavojo estas malsana kaj kuŝas en fora sanatorio. Ni profitu lian maleston kaj ĝuu la liberecon!

F-ino Regultri malfermis la pordon de la Fundamento kaj eliris, ŝin sekvis ĉiuj reguloj ekde f-ino Regulunu ĝis f-ino Reguldekses.

Post kelkaj mejloj ili renkontis fremdan regulon, kiu afable salutis ilin:

– Bonan matenon, koleginoj! Kien vi iras?

Ili haltis kaj respondis:

– Ni nur iom ekskursas en la ĉirkaŭaĵo de la Fundamento.

– Ho, mi bone konas la Fundamenton kaj volonte apartenus al ĝi.

F-ino Regulses, la plej granda, rimarkigis:

– Bedaŭrinde, ni rajtas esti nur dek ses, ne pli.

– Kiu ordonis tion?

– Nia patro, d-ro Zamenhof.

– Ba, d-ro Zamenhof mortis antaŭ multaj jaroj. Se li ankoraŭ vivus, li certe adoptus min kiel dek-sepan filinon.

– Kion do vi kapablas fari?

– Per mi Esperanto estus ankoraŭ pli facila. Oni nomas min Zozo. Kial? Tial ke oni povas en frazo anstataŭigi per «zozo» ĉiun nekonatan aŭ forgesitan vorton. Mi funkcias kiel ĵokero en ludo. Ni supozu, ekzemple, ke iu forgesis aŭ ankoraŭ ne lernis la vorton «ombrello». Li simple diras: «Kiam pluvos, mi prenas mian zozon».

Se li ne konas la verbon «fumi», li diras: «Mi zozas cigaredon».

Ĉiuj aplaudis krom f-ino Reguldekses, kiu energie protestis:

– Ne, ne! La tuta mondo scias, ke Esperanto havas dek ses regulojn. Mi estu por ĉiam la lasta regulo de la Fundamento!

Post mallonga silento Zozo proponis:

– Se mi vere ne povas fariĝi f-ino Reguldeksep, eble malgrava regulo de la Fundamento devus cedi al mi sian lokon.

Ĉies rigardoj turnis sin al f-ino Regulnaŭ. Zozo severe demandis ŝin:

– Por kio vi servas en la Fundamento?

F-ino Regulnaŭ balbutis:

– D-ro Zamenhof konfidis al mi la gardadon de jena leĝo: «Ĉiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita».

Zozo rikanis:

– Mi ja respektas d-ron Zamenhof, sed li estis verŝajne laca, kiam li inventis tiun superfluan regulon. Kial li ne preskribis same: «Por paroli Esperanton, oni malfermu la buŝon» aŭ «Por lavi siajn piedojn, bona esperantisto demetas siajn ŝuojn»?

Tiom da sprito tiel ridigis la ceterajn regulojn, ke ili senkompatate forlasis f-inon Regulnaŭ en angulo de arbaro kaj transdonis ŝian lokon al la fremda, senhonta regulo. Zozo persvadis siajn naivajn koleginojn tuj reiri en la urbon kaj komisi la presiston la eldonadon de nova Fundamento.

Pri la nombro da interpretistoj kaj pri la aliaj institucioj mi ne konas la ekzaktajn ciferojn.

Oni produktas milionojn da tradukitaj paĝoj ĉiujare. La interpretistoj asekuras samtempan parolan tradukadon dum centoj da horoj ĉiumonate. Kiom kostas la funkciado de tiuj servoj?

En 2007, oni estimis ke la Komisiono elspezus 302 milionoj da eŭroj. Kune, la tutaĵo de ĉiuj traduk- kaj interpretadservoj de ĉiuj institucioj estis sume ĉirkaŭ 800 milionoj da eŭroj en 2006, malpli ol 2 eŭroj jare por ĉiu loĝanto de la Unio. Tio estas proksimume 1% el la suma buĝeto de la Unio. Malgraŭ la kresko de la nombro da lingvoj, la kostoj de la lingvaj servoj kreskis nur je 20%, ĉar oni laboras multe pli efike.

Tamen la lingva politiko de Eŭropa Unio ne estas aplikata same efike en ĉiuj kampoj. Estas multaj mankoj en la informado al la civitanoj, precipe pere de Interreto. Se vi serĉas ion en la paĝaroj de la diversaj institucioj, ofte vi trovos nur informojn en la angla, kelkfoje en la angla, franca kaj germana, kelkfoje en pluraj aliaj lingvoj, sed malofte en ĉiuj lingvoj.

La Unio celas stimuli la civitanojn por ke ili lernu almenaŭ du fremdajn lingvojn, el kiu unu de najbara lando. Sed tiu agado ne estas vere efika. Ĝia sukceso dependas de la naciaj registaroj, kiuj finfine respondecas pri la edukado de siaj civitanoj. La plej multaj registaroj favoras la lernadon de la angla, sed neglektas la instruadon de aliaj lingvoj. En kelkaj landoj estas malfacile trovi publikajn lernejojn kie oni instruas aliajn lingvojn, krom la angla. Kaj la plej multaj homoj mem opinias, ke sufiĉas lerni la anglan.

Por konkludi, permesu al mi ke mi diru ankoraŭ ion pri Esperanto, ĉar mi kaj vi mem estas esperantistoj. Multaj esperantistoj esperas ke Esperanto estu agnoskita de Eŭropa Unio. Sed ĝis nun la Unio tutsimple ignoras Esperanton. La kialo estas duobla: unue, la Unio ne volas unu komunan lingvon, ĝi preferas la multlingvecon; due, ĝi agnoskas nur la lingvojn parolatajn en la membro-ŝtatoj, ĉu naciaj lingvoj, ĉu regionaj aŭ minoritataj.

Kiam oni parolas pri la politikoj aŭ pri la decidoj de Eŭropa Unio, oni kredas ke tiuj politikoj aŭ tiuj decidoj rezultas de memstara decidpovo de la Unio. Sed la Unio ne havas memstaran decidpovon. Oni forgesas ke la politikoj kaj la decidoj de la Unio rezultas fakte el la sumo aŭ la mezumo de la volo de ĉiuj membro-ŝtatoj. Kelkaj decidoj devas esti unuanime prenitaj, por aliaj decidoj necesas nur la plimulto da voĉoj. La Unio estas ofte uzata kiel "propeka kapro" por forgesigi ke ĝiaj decidoj dependas ekskluzive de la membro-ŝtatoj kaj de la Eŭropa Parlamento.

Se esperantistoj volas agadi por Esperanto je la nivelo de Eŭropa Unio, ili devas agadi antaŭ ĉio je la nacia nivelo, por ke la registaro kaj la eŭropaj parlamentanoj de sia lando decidu favore al Esperanto.

Karaj geamikoj: mi ne estas raŭmisto sed mi estas realisto. Esperanto ne povas "finvenki" nur en Eŭropo. Ĝi devas esti agnoskita de la tuta mondo kaj ne nur de regiona unuiĝo de landoj. Kaj tiu celo, bedaŭrinde, ne efektiviĝos baldaŭ. Dankon pro via atento kaj pacienco.

**José Augusto Pinto de Sousa**

Profesia tradukisto en la Konsilio de Ministroj de Eŭropa Unio, Bruselo  
Daŭrigo: dua lasta parto de la prelego en La Verda Stelo, Antverpeno, la 18-an de Januaro 2008

Eĉ pli absurda fariĝas tio okaze de parencaj lingvoj. Ekzemple, teksto aŭ parolado originale en la nederlanda, unue tradukita en la anglan kaj laŭvice el la angla en la germanan. La rezulto ne povas esti fidela kiel rekta traduko el la nederlanda en la germanan.

Alian problemon okazigas la tekstoj aŭ paroladoj de alilingvanoj kiu uzas unu el la laborlingvoj, kiu ne estas la sia. Ekzemple: raporto pri kunveno skribita en la angla de itala raportisto. Ofte la raportisto ne bone regas la laborlingvon kaj la angla teksto estas aĉa. La homoj kiuj devas traduki tiun tekston en aliajn lingvojn devas spekulii aŭ diveni kion la raportisto celis diri.

Kompare kun la situacio antaŭ la lastaj plilarĝiĝoj, la kvalito de la tradukoj estas neeviteble malpli bona.

#### 4. Efiko de la lingva politiko de Eŭropa Unio

En ĉiuj traktatoj ĝis nun subskribitaj kadre de la Eŭropaj Komunumoj kaj de la Unio, la principo de unueco en la diverseco ĉiam estis emfazita. Nacia, kultura kaj lingva diverseco kaj egaleco, estas la devizo.

Kiam nova lando aliĝas al la Unio, ĝi devas transpreni la jam akiritan kaj validan leĝaron de la Unio. Tiu leĝaro, kiu konsistas el la Traktatoj kaj la sekundara juro, devas esti antaŭe tradukita. Entute ĉirkaŭ 90 000 paĝoj. La kandidata lando mem zorgas pri la traduko, sed la tradukservoj de la Unio devas kontroli la kvaliton de la traduko, finpreti la dokumentojn kaj publikigi ilin. Tio signifas ke oni devas varbi tradukistojn jam antaŭ la aliĝo. Jam dufoje Norvegio kandidatiĝis al la aliĝo kaj ambaŭfoje la norvegoj, per referendumo, voĉdonis kontraŭ: en 1972 kaj en 1994. En la institucioj oni devis trovi alian laboron por la norvegaj tradukistoj kiuj jam estis dungitaj, ĉar oni ne maldungas oficistojn, nur kiel puno, pro grava misfaro.

La traduko de la leĝaro, kaze de kelkaj malgrandaj lingvoj, okazigas riĉigon de la lingvo, ĉar ĉiuj terminoj de ĉiuj validaj leĝoj devas esti tradukitaj. Ofte oni devas krei novajn terminojn, ĉar ili ne estis bezonataj antaŭe kaj pro tio ne ekzistis. Por doni nur kelkajn ekzemplojn: landoj sen fervojoj, kiel Malto, devas tamen traduki ĉiujn leĝojn rilatajn al fervojoj. Landoj sen maro, kiel Slovenio, Ĉeĥio, Hungario ktp, devas traduki ĉiujn tekstojn aplikeblajn al la mara fiŝkaptado kaj navigado.

En la komenco, en ĉiu lingvo oni devis fari gigantan terminologian laboron – kiu neniam antaŭe estis farita. Kompreneble, kelkaj lingvoj estas pli riĉaj je fakterminoj ol aliaj. Lingvoj parolataj en diversaj landoj aŭ diversaj kontinentoj havas ĝenerale pli grandan vortrezoron ol lingvoj parolataj nur en malgrandaj regionoj. Do, unuflanke "grandaj" lingvoj, la angla, la franca, la germana, la hispana. Aliflanke "malgrandaj", kiaj la irlandaj, la malta, la slovena, la baltaj lingvoj.

En la kazo de la baltaj lingvoj – la estona, la latva, la litova –, dum la tempo de Soveta Unio ili preskaŭ ne plu estis uzataj en scienco, tekniko, komerco, ĉar la rusa estis la plej uzata lingvo, ankaŭ en la baltaj landoj. La aliĝo al Eŭropa Unio garantiis la riĉigon kaj la plifirmigon de tiuj lingvoj.

Ni revenu al la aplikado de la de la politiko de multlingveco en Eŭropa Unio. En la diversaj tradukservoj de la Unio laboras miloj da tradukistoj, interpretistoj kaj aliaj oficistoj kiuj zorgas pli la funkciado de la servoj. Ĉe la Komisiono, en 2006, laboris 1 750 plentempaj tradukistoj kaj 600 aliaj oficistoj. Ĉe la Konsilio laboras nun ĉirkaŭ 700 plentempaj tradukistoj kaj kelkaj centoj da oficistoj ligataj al la tradukservo.

Sekve multaj homoj eklernis sensuspekte la dek ses regulojn, inkluzive la nezamenhofan naŭan: «Kiam parolanto de la lingvo Esperanto ne scias vorton, li simple uzu anstataŭe la radikon zoz-, kiu memstaran signifon ne havas».

Kio baldaŭ okazis? Babelo inter la esperantistoj mem: la Lingvo Internacia, la plej klara lingvo en la mondo, fariĝis nenomebla ĵargonaĉo, terura galimatio, ankoraŭ pli nekomprenbla ol Volapuko. Neniu lernanto penis parkerigi vortojn. Ĉiu ĉiam ĉie ĉiel uzis la lingvan ĵokeron. Iu procesis kontraŭ iu, pretekste ke tiu lin insulte nomis zozego.

Aŭtoj karambolis, tial ke neniu sciis, ĉu «zoza» signifas «ruĝa» aŭ «verda», «dekstra» aŭ «maldekstra». Policano enkarcerigis pasanton, kiu kriis «Zozu la prezidanto!»

Komercistoj bankrotis, ĉar ili ricevis mendoleterojn, kiuj tekstis proksimume: «Estimata zozo, zoze zozinte vian zozon de la 3-a de aprilo, mi zozas tujan prizozon de alia zozajo». Feliĉe, la zoza periodo de Esperanto daŭris nur du monatojn.

La kompatinda forĵetita regulo de Fundamento petveturis al la fora sanatorio de d-ro Lavojo. Kiam la resaniĝanta prezidanto de la Akademio ekvidis f-inon Regulaŭ, li preskaŭ sufokiĝis:

– Kio? Vi ĉi tie? Sola? Kie estas viaj kunulinoj?

F-ino Regulaŭ murmuris:

– Ili eksigis min.

La prezidanto demetis sian piĝamon, surmetis sian akademian uniformon, kaptis valizon per la maldekstra mano, f-inon Regulaŭ per la dekstra mano kaj galopis al la stacidomo. Dumvojaĝe li petis de ŝi detalan raporton pri la katastrofa situacio. Liaj okuloj fulmis, kaj li senĉese grumblis:

– Oni vere ne rajtas malsaniĝi. Ha, idiotinoj! Ha, perfidaj porkinoj!

La kunveno en la granda salono de la Fundamento restos por ĉiam unu el la plej tumultaj momentoj en nia historio. La prezidanta voĉo tondris kaj tremigis la murojn. Zozo kaŝis sin malantaŭ la hontoplenaj, teruritaj, plorĝemantaj reguloj kaj provis piedpinte eskapi merititan punon, sed d-ro Lavojo haltigis ŝin:

– Vi! Jes, vi! Alproksimiĝu!

Zozo paliĝis.

– Vi profitis mian maleston por konfuzi la harmonian aranĝon de nia Esperanto. Fi al vi! Tuj malaperu aŭ vi ricevos piedbaton sur vian, sur vian...

Ŝi nesage balbutis: – Sur mian zozon?

Kun ruĝa vizaĝo li furioze blekis plengorĝe: – Sur vian postaĵon!

Zozo forkuris. La Lingvo Internacia iom post iom reakiris sian kutiman klarecon. Okaze de la Librotago oni ĵetis en grandan ĝojofajron ĉiujn ekzemplerojn de la falsa Fundamento, krom unu, kiun pie konservas la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno.

<http://www.esperanto.mv.ru/Vojagxo/zozo.html>

#### **POR IUJ LA ANGLA ESTAS LIBERIGA LINGVO**

Okaze de la Eŭropa tago de lingvoj la 26-an de septembro, la prezidanto de UEA cerbumas pri la signifo de la multlingveco en Eŭropo. Laŭ li, pro la drasta kresko de la signifo de la angla, grandaj eŭropaj lingvoj, kiuj ĝis nun estis kontinente aŭ eĉ tutmonde signifaj, ĉiam pli iĝas "regionaj limigitaj". Ne ĉiuj trovas tiun evoluon bedaŭrinda, li konstatas: "Multaj parolantoj de lingvoj, kiuj en la antaŭaj epokoj ne estis gravaj kaj potencaj, trovas sin gravitantaj ĝuste al la angla kaj sentantaj liberigon rilate al la tradicie subpremaj 'tiranaj' lingvoj en sia regiono." La reganta situacio kreas novajn dilemojn por tiuj, kiuj volas disvastigi Esperanton.

**Probal Dasgupta in Libera Folio**

## FINIĜIS LA ERAO DE RESPONDKUPONOJ

Dum multaj jardekoj UEA akceptis pagojn per internaciaj respondkuponoj. Ili estis simpla pagmaniero, kiam internaciaj pagoj per banko au poŝtmandato estis malfacile fareblaj kaj subigitaj al diversaj limigoj aŭ eĉ ne permesitaj al privatuloj. Lastatempe ilia uzado maloftiĝis, ĉar internaciaj pagoj fariĝis pli facilaj dank' al la forigo aŭ mildigo de limigoj kaj pro disvastiĝo de kreditkartoj kaj de retaj pagmanieroj kiel ekz. PayPal. En 1997 UEA ankoraŭ ricevis 1652 respondkuponojn sed en 2007 nur 43, t.e. 2,6% de la nombro dek jarojn pli frue. Antaŭe UEA povis facile ŝanĝi la kuponon en poŝtmarkojn en sia kutima poŝtoŭficejo, preskaŭ vid-al-vide al la Centra Oficejo trans la strato. Nuntempe la poŝtoŭficejo ne plu akceptas ilin, kaj ĉi-jare nur per escepta aranĝo la poŝta entrepreno TNT konsentis akcepti de UEA, por la lasta fojo, kvanton da kuponoj. Ankaŭ en multaj aliaj landoj internaciaj respondkuponoj ne plu estas vendataj nek akceptataj de la poŝto. Antaŭe ili ankaŭ havis senliman validecon, sed jam de kelkaj jaroj ili validas nur ĝis la dato presita sur ili. Parto de la kuponoj, kiujn UEA ricevis de siaj membroj kaj klientoj, estis senvaloraj jam, kiam ili estis senditaj al UEA. Evidente ili antaŭe cirkulis inter pluraj homoj, kaj neniu rimarkis, ke ilia valideco estis tempe limigita. Pro tiu evoluo UEA ne plu akceptas internaciajn respondkuponojn kiel pagilojn por kotizoj aŭ servoj nek por aldoni bonhavan al UEA-kontoj.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

## KAŬKAZA TENSIO MALPLIBONIĜAS

Rusa registraro agnoskis sendependiĝo de Kartvelaj regionoj Abĥazio kaj Suda Osetio, fine de Aŭgusto. Rusio kaj Kartvelio batalis nelongan militon pri la du provincoj. Tbilisi provis repreni Sudan Osetion per militaj fortoj en Aŭgusto kaj tuj Moskvo lanĉis repuŝatakon. Usonaj respondeculoj deklaris siaflanke, ke iu movo al agnosko de sendependeco de la du regionoj estus kontraŭa al la internacia juro.

Ambaŭ regionoj havis efektivan sendependecon ekde ilia disiĝo en la fruaj 1990-aj jaroj. Dum ili ĝuas rusan ekonomian kaj diplomatian subtenon, kaj militistan protekton, neniu fremda ŝtato tamen agnoskis ilin kiel sendependaj ŝtatoj. Usono kaj kelkaj okcidentaj registaroj subtenis Kartvelion, sendis helpon. La diversaj danĝeraj konfliktoj en la Kaŭkaza mondparto ŝajne ne baldaŭ estos solvitaj.




eo.eventeo.net

## LINGVA POLITIKO DE EŬROPA UNIO: TEORIO KAJ PRAKTIKO

### 3. Laboro de la interpretistoj kaj tradukistoj

Por ebligi la multlingvan funkciadon de la Unio, la diversaj institucioj devis krei proprajn traduk- kaj interpretadservojn. Miloj da profesiaj tradukistoj kaj interpretistoj laboras en la institucioj mem kaj kelkiloj da eksteruloj laboras sendepende aŭ pere de privataj entreprenoj por la eŭropaj institucioj. Ili laboras en Bruselo kaj Luksemburgo kaj multaj el la oficistoj devas ofte vojaĝi al Strasburgo, okaze de la plenaj sesioj de la Parlamento.



Fakte temas pri giganta traduk- kaj interpretadservo, se oni aldonas la tradukservon de ĉiu institucio unu al la alian. Kune ili formas la plej grandan tradukservon en la mondo. Neniu alia internacia organizo havas tiom da oficialaj lingvoj ol la Eŭropa Unio, 23, mi ripetas. Ekzemple: Unuiĝintaj Nacioj. kun preskaŭ du cent membro-ŝtatoj, havas arbitre nur ses oficialajn lingvojn: la araban, la anglan, la francan, la ĉinan (mandarenan), la rusan kaj la hispanan. La Konsilio de Eŭropo, kiu kunigas ĉiujn eŭropajn landojn, havas nur du oficialajn lingvojn: la anglan kaj la francan. Kaj la samo validas por la milita organizo NATO – Nordatlantika Traktato Organizaĵo.

Ni vidu nun kiamaniere oni tradukas kaj interpretas. Antaŭ la granda plilarĝiĝo de 2004, kiam 9 novaj lingvoj aldoniĝis al la nombro da oficialaj lingvoj, oni klopodis traduki kaj interpreti ĉiam rekte de unu lingvo en la alian kaj ĉiam de fremda lingvo en sian propran. Tio signifas ke fariĝis pli kaj pli malfacile trovi tradukistojn kaj interpretistojn por ĉiuj lingvaj kombinoj. Kiam Portugalio aliĝis en 1986 mankis homoj kiuj regis la grekan, la nederlandan kaj la danan. Pro tio la institucioj stimulis la oficistojn por ke ili lernu la deficitajn lingvojn dum la laborhoroj kaj je la kostoj de la institucio. Mi mem lernis la grekan post mia enoficiĝo.

Tamen, post la laŭvicaj plilarĝiĝoj, tiu politiko ne plu eblis. Antaŭ 50 jaroj, kiam la Eŭropa Ekonomia Komunumo estis kreita, kun 4 oficialaj lingvoj, estis entute 6 malsamaj lingvaj paroj, kun 12 lingvaj kombinoj. Nun, kun 23 oficialaj lingvoj, oni havas 253 lingvajn parojn kaj 506 kombinojn!

Evidente, la antaŭa labormetodo de la plej multaj institucioj – do, rekta traduko de la originala lingvo en la propran – ne plu estis realigebla. Oni decidis uzi pontlingvojn, tio estas: oni tradukas aŭ interpretas unue el unu "malgranda" lingvo en unu el la "grandaj" kaj poste de tiu lingvo en ĉiujn aliajn. Se necese, oni tradukas aŭ interpretas eĉ el la propra lingvo en alian.

Ankoraŭfoje, la diversaj institucioj havas sian propran metodon. Ĉe la Komisiono, la laborlingvoj – do la angla, franca kaj germana – estas ankaŭ la pontlingvoj. Ĉe la Konsilio oni decidis uzi la anglan kaj la francan. Ĉe la Eŭropa Parlamento oni uzas ses diversajn lingvojn por la interpretado kaj tradukado de dokumentoj: la anglan, francan, germanan, italan, polan kaj hispanan. Sed por la skriba traduko de la paroladoj de la parlamentanoj dum la plenaj sesioj, kiu estas farata post la sesioj, de eksteraj tradukistoj, oni decidis uzi nur la anglan kiel pontlingvo.

Ĉu la kvalito de la traduko kaj de la interpreto pere de pontlingvo estas garantiita? Kompreneble ne. Rekta traduko aŭ interpreto de unu lingvo en la alian estas precipe pli altkvalita, kondiĉe ke la tradukisto aŭ interpretisto bone regas la fontlingvon kaj sian propran lingvon. Traduko de alia traduko preskaŭ ĉiam signifas malpli bonan rezulton ol senpera traduko.

Por pritakti la problemojn, reprezentantoj de ILEI kaj UEA kune kunsidis malantaŭ fermitaj pordoj vespere la 22-an de julio. Reprezentantoj de UEA konfrontis sian ĉefan fakan asocion pro ĝenerala malkontento, pri la arbitra flankenigo de Zsófia Kóródy, la taskigito de komuna Internacia Ekzamena Komisiono pri la nova komuna ekzamina sistemo. Montriĝis klare, ke la decidon ekzigi Zsófia Kóródy de ŝia funkcio en la komisiono pri Internaciaj Ekzamenoj ILEI/UEA faris Atilio Orellana Rojas (la sekretario de ILEI) sola. Tiu forigo, se efektivigita, sendube povus forte influi la kunlaboron kun ALTE.

En 2007 Zsófia Kóródy kune kun Katalin Kováts, subtenite de UEA, multe laboris pri la tradukigo, adapto kaj formala akceptigo de la teksto kaj la reguloj de Komuna Eŭropa Referenckadro por Lingvoj, iniciato de la Eŭropa Konsilio. Ĝia esperata oficiala akcepto igus Esperanton unu el la lingvoj, pri kiuj eblas oficiale ekzameniĝi je eŭropa nivelo.

Dum la fermita kunsido la estraro ILEI ne sukcesis pravigi la decidon de la sekretario, kaj ĝenerale montriĝis negativa pri la decido, kun la escepto de estrarano Aida Ĉizikaitè, kiu apogis la agojn de Atilio Orellana Rojas. Fine de la kunsido reprezentanto de UEA agnoskis la grandan laboron faritan de Zsófia Kóródy kaj ŝiajn meritojn kiel pedagogo, sed aldonis, ke en la internajn aferojn de ILEI UEA ne enmiksiĝos. Dume, pro manko de fido al ILEI, UEA nun decidis reteni ekskluzive ĉe si certajn rajtojn pri la komunaj Ekzamenoj UEA/ILEI, kiel ekzemple ĉion rilatan al la Komuna Eŭropa Referenckadro por Lingvoj.

La interna konflikto en la estraro de ILEI ŝajne ne baldaŭ estos solvita, ĉar en Roterdamo la komitato de ILEI ne kunsidis. Dum ILEI-konferenco en Benino, malmultaj komitatanoj ĉeestis, kaj sekve la supera organo de ILEI ne povis fari validajn decidojn.

ILEI perdis siajn oficialajn rilatojn kun Unesko, la organizaĵo de UN por edukado, scienco kaj kulturo. La kialo de la nuligo ŝajne estis la neglekto de ILEI sendi raporton al Unesko pri sia kontribuo al la celoj de Unesko dum la pasintaj ses jaroj. La prezidanto de ILEI confirmis la nuligon de la oficialaj rilatoj kun Unesko, sed ne volis komenti la aferon pli detale. Laŭ François Lo Jacomo, unu el la reprezentantoj de ILEI ĉe Unesko, la okazintaĵoj eblas facile ripari, se tio necesos.

Libera Folio

### KUNVENOJ TEVA, ILEI, TEJO

Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio kaj Internacia Vegetarana Unuiĝo festis kunan centjariĝon kaj okazigis en Dreseno, Germanio, de la 27a Julio ĝis la 1a de Aŭgusto, ilian 38an Kongreson kun 600 vegetaranoj el 30 landoj. Partoprenis estraranoj de TEVA, sekretario Heidi Goes el Brugge, vicprezidanto Francesco Maurelli kaj prezidanto Christopher Fettes.



Heidi Goes kaj Gregor Hinker

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj okazigis konferencon en Portonovo, Benino, de la 30a de Julio ĝis la 5a de Aŭgusto, kun 42 anoj el 13 landoj. Prelegis Jasuo Hori, Tiekio Isikawa, Charles Alofa, Francis Agbenou, Renée Triolle, Jean-Pierre Boulet, Vladka Chvatalova, Ana Montesinos, Mireille Grosjean, Tazima Majuko, Aida Ĉizikaitè.

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo festis 70jara naskiĝdatreveno kaj okazigis sia 64a Internacia Junulara Kongreso en Szombathely, Hungario, de la 26a Julio ĝis la 2a Aŭgusto, kun 485 aliĝintoj el kies partoprenis 365 el 36 landoj, plejmultnombre 60 hungaroj, 49 rusoj, 43 germanoj. Multaj aliĝintaj afrikanoj kaj azianoj ne sukcesis havi vizon. Gregor Hinker, nuna prezidanto de TEJO, faris interesan salutprelegon.


### ROTerdAMANOJ NenIAM AŬDIS PRI EsperANTO

Partoprenonte la Universalan Kongreson en Roterdamo, Dennis Keefe decidis daŭrigi sian pasintjaran amatoran enketon kaj demandi al Roterdamanoj "kie estas Esperanto". Li esperis, ke almenaŭ kelkaj indikos al li la vojon al la Centra Oficejo de UEA aŭ al la kongresejo. Lia espero ne plenumiĝis. Nur unu persono el la unuaj dek entute sciis, ke Esperanto estas lingvo, kaj kvankam li faris la enketon proksime al la Centra Oficejo de UEA, foje eĉ tuŝante la muron de la oficejo, neniu povis diri al li, kien iri por trovi tiun misteran Esperanton.

### KVAR EL DEK EN FrancIO AŬDIS PRI EsperANTO

La landa asocio de UEA en Francio faris surstratan sondadon por ekscii, kiom da homoj scias kio estas Esperanto. Estis kolektitaj 1.500 respondoj, kaj el la respondintoj proksimume 40 procentoj diris, ke ili jes aŭdis pri Esperanto. La plej multaj sciis, ke temas pri lingvo. Kvarono el tiuj, kiuj ion sciis pri Esperanto, ricevis siajn sciojn en la lernejo, kvinono de familianoj. Klare malpli multaj ricevis informojn tra gazetoj aŭ televido. En sia raporto pri la esploro Cyrille Hurstel, vicprezidanto de Esperanto-France, skribas ke necesas pli da scioj por plani la agadon de la asocio. La franca enketo estis farita amatore, kaj kredeble havas plurajn mankojn el la vidpunkto de profesiuloj, sed supozeble estas pli bone scii ion pri la temo ol scii nenion. Rimarkindas, ke la rezulto forte diferencas de la respondoj pri kiuj Dennis Keefe samtempe raportas.

Libera Folio



Origino de la scio pri Esperanto en Francio

## POLICO EN UK ROTERDAMO

Dum la UK en Roterdamo kongresano Gunnar Olsson el Svedio estis arestita de la polico, ĉar li rifuzis montri sian kongresan insignon. La jaŭda numero de la kongresa kuriero, kun frontpaĝa artikolo pri la okazaĵo, estis lastminute cenzurita de la Centra Oficejo. La konflikto de Gunnar Olsson kun la Loka Kongresa Komitato en Roterdamo komenciĝis jam en la unua tago de la kongreso. Gunnar Olsson bonorde pagis sian kotizon, sed fidela al sia kutimo rifuzis pendigi ĉirkaŭ sia kolo la kongresan nomŝildon. Reprezentantoj de la LKK plurfoje atentigis lin, ke kongresanoj devas porti la nomŝildon videble, sed Gunnar Olsson rifuzis. La konflikto kulminis marde matene je la 10-a horo, kiam devis komenciĝi gitara koncerto en la granda salono Hodler. Laŭ la vortoj de Gunnar Olsson, li alvenis al salono Hodler iom antaŭ la komenciĝo de la koncerto kaj trankvile sidiĝis en seĝo proksime al la scenejo. Ĉar la halon de la kongresejo povis eniri ankaŭ nekongresanoj, la insignoj en Roterdamo estis kontrolataj ne ĉe la enirejo, sed tuj antaŭ la programeroj. Tial post iom da tempo kontrolisto aliris antaŭ lin kaj petis, ke li montru sian nomŝildon, kiu ne estis videbla. Rakontas Gunnar Olsson: - Mi ne faris, ĉar li jam bone scias ke mi aliĝis al UK. Apudsidantaj homoj diris ke mi bone pagis, kaj kelkaj eĉ montris mian kongresnumeron en la libro. Post ankoraŭ iom da tempo venis tri, eble kvar, gardistoj por elĵeti min, sed mi restis en la seĝo. Fine venis du policistoj, kaptis min je miaj brakoj, kaj eltiris min el la salono. La tuta spektaklo daŭris eble duonan horon.

Jam en alia ĉambro de la kongresejo Gunnar Olsson fine montris al la policanoj sian kongresan insignon, sed jam estis tro malfrue. Li estis forveturigita al la apuda policejo kaj fermita en ĉelo dum du horoj, ŝajne ĉar li ne havis sian pasporton kun si. Li estis poste liberigita, kiam alia kongresano alportis lian pasporton. Post la incidento Gunnar Olsson plu ĉeestis en la kongreso, tute sen

insigno, sed li ne opinias, ke li gajnis sian batalon: - Ne, mi malgajnis. Mi estas dumviva membro de UEA, sed ĉi tiu estas mia lasta kongreso, mi ne plu volas partopreni. Mi forlasos ĉi tiun parton de la movado.



Gunnar Olsson

Kongresano Kristin Tytgat el Belgio helpis al Gunnar Olsson liberiĝi el la policejo. Ŝi malaprobas la agadon de la LKK: - Mi ne povas kompreni kaj akcepti ke pro interna konflikto en Esperantujo oni vokas la policon. Se ekestas problemo, oni devas solvi ĝin interne de nia movado. Nun ni kongresis en Nederlando, sed ne en ĉiuj landoj de la mondo la polico reagus en tiu ĉi maniero! Due, mi ne povas kompreni ke konata esperantisto kaj mecenato povas esti traktita en tiu ĉi maniero. Ĉu por UEA gravas nur proceduraj demandoj?

Ĉar la marda gitar-koncerto malfruiĝis duonhoron pro la okazaĵo, multaj kongresanoj mem vidis la agadon de la polico aŭ aŭdis famojn pri ĝi. En la kongresa kuriero oni tamen ne povis legi pri la afero, ĉar la artikolo estis lastmomente cenzurita.

Rakontas Brunetto Cassini: - Estante redaktoro de la kuriero, kaj profesia ĵurnalisto, mi taksis mia devo verki pri tio artikolon, unue por atesti la okazintaĵon, due por esprimi mian propran perplekson kaj embarason, antaŭ tiel publika ago kontraŭ kongresano, kiu tamen pagis sian kotizon. La mallongan artikolon transprenis Roy McCoy, la ĉefa redaktoro de la kongresa kuriero. Ĝi estis lokita en la suba maldekstra angulo de la frontpaĝo, la gazeto estis sendita al la presejo, kaj preparita por publikigo en la retejo de la

kongreso. Sekvant-matene, mi estis informita ke la Centra Oficejo decidis interrompi la presadon de la Kuriero, rakontas Brunetto Cassini. Anstataŭ la malpermesita artikolo en ĝia loko aperis foto pri ekspozicio en la Centra Oficejo. Roy McCoy estis surprizita de la decido haltigi la numeron, kiun li mem preparis por publikigo.

Libera Folio

## LA CENZURITA ARTIKOLO

La starto de marda koncerto estis prokrastita pro interveno de la polico, kiu arestis kongresanon. La kulpo de la cernateno estis, ke li forgesis sian kongresan nomŝildon en la hotelo kaj, kiel ni ofte estas atentigataj, oni ne rajtas eniri la kongresejon sen sia nomŝildo. La faktoj, ke la koncerna kongresano estas bone konata honesta samideano, kiu eĉ finance kontribuas al pluraj movadaj iniciatoj, kaj ke li aperas en la Kongresa Libro kiel KN 1061, ne ŝajnis esti vere prikonsiderataj. Nu, ni konsentas ke leĝoj estas leĝoj kaj reguloj estas reguloj, sed ilin oni povas apliki en senfina vico da nuancoj. Kiel kongresanoj kaj gastoj de tiu ĉi alloga, multnacia kaj avangarda urbo, plimulto el ni certe estus preferintaj, ke oni estu elektinta malpli drastan manieron por apliki cetere kompreneblan kaj logikan regulon.

## UEA NE PLU FIDAS ILEI

Zsófia Kóródy estas hungara Esperanto-instruistino, aktivulino de la Interkultura Centro Herzberg en Germanio. Ŝi diplomiĝis pri Esperanto en la ELTE-universitato en Budapeŝto. Dum pluraj jaroj ŝi estis vicprezidantino de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj).

Atilio Orellana Rojas naskiĝis (1963) kaj studis, en Argentino Filologion pri Klasikaj Lingvoj. Eklernis Esperanton en 1984. Studis, instruis kaj laboris kiel interpretisto de la rusa lingvo. De 1988 instruas Esperanton laŭ rekta (Cseh) metodo, kaj kiel vojaĝanta instruisto gvidis kursojn en pli ol 60 landoj. De 1997 loĝas en Nederlando. Laboras kiel

Direktoro de la Internacia Esperanto-Instituto en la Hago, Nederlando, prizorganta la edukadon de novaj Esperanto-instruistoj.



Zsófia Kóródy

Atilio Orellana Rojas

Urĝa kunsido malantaŭ fermitaj pordoj okazis dum la Roterdama Universala Kongreso inter reprezentantoj de Universala Esperanto-Asocio kaj la estraro de ILEI. La publikaj plendoj de Zsófia Kóródy pri mankohava financa raportado, kaj rilata skismo en la estraro de ILEI, ŝajne ne estis formale traktitaj dum la komuna kunsido, ĉar UEA konsideras tion interna afero de ILEI. La ĉefa rezulto de la kunsido estis, ke UEA ne plu fidus sian propran fakan asocion, sed nun sola transprenas la respondecon pri la ellaborado de la nova ekzamena sistemo kaj pri la kunlaboro kun ALTE, la Eŭropa Asocio de Lingvotestistoj.

La profunda konflikto iĝis publika post kiam la Internacia Ekzamena Komisiono eksciis ke la vicprezidantino de ILEI, Zsófia Kóródy, estis eksigita el sia posteno en Junio, kaj ne plu havis la taskon labori pri la nova ekzamen-sistemo de ILEI.

Mireille Grosjean, la prezidantino de la Internacia Ekzamena Komisiono, memorigis, ke IEK ne estas propraĵo de ILEI, kaj ke ĝiaj anoj estas komune nomumataj de ILEI kaj UEA. Sian konsterniĝon pri la okazaĵo tiam ŝi esprimis: -Mi miras, ke kiel IEK-prezidantino mi estis nek oficiale informita nek konsultita pri la eblo, ke la laboro pri starigo de nova ekzamensistemo iru de la manoj de Zsófia Kóródy al la manoj de Atilio Orellana Rojas.

...